

la
verda
stelo



ESPERANTO
NEDERLAND

SEKCIO GRONINGEN-DRENTE
&
FRISA ESPERANTISTA RONDO

decembro 2006



LA VERDA STELO

eldono de

ESPERANTO NOORD-NEDERLAND

ESPERANTO-KLUBO GRONINGEN-DRENTE

prezidanto

s-ro J.B. Swenker

T.W.S. Mansholtstraat 25

9728 MC Groningen

tel. +3150 527 45 72

retadreso:

prezidanto.groningen@esperanto.hobby.nl

sekretario

s-ino W. van Ganswijk-Vlasblom

Huygensstraat 27

9727 JA Groningen

tel. +3150 525 00 86

retadreso: wvganswk@xs4all.nl

kasisto

s-ro L. Staghouwer

Julianalaan 25

9781 ED Bedum

tel. +3150 301 40 15

retadreso: luitstaghouwer@home.nl

FRISA ESPERANTISTA RONDO

s-ro W. Akkerman

Westerein 14 a

8571 GB Harich (Frl)

tel. +3151 460 22 72

retadreso: wiebrenakkerman@hetnet.nl

ttt-ejo

<http://pingveno.nl/klubo>

kunvenejo

Dreesflat, W. Dreesstraat 1

ĉiun alternan ĵaŭdon ni kunvenas

de la 19h45 ĝis la 21h45

Esperanto-centro

T.W.S. Mansholtstraat 25

9728 MC Groningen

J.B. Swenker, tel. +3150 527 45 72

redakcio

Koos Scharroo

Wil van Ganswijk-Vlasblom

retpoŝto: laverdastelo@pingveno.nl



Enhavo

3 ... Studosemajfino Hoek van Holland

4 ... Klubkunvenoj, naskiĝdatoj

5 ... Kio pri la nordo?

10... Via kato - Marjorie Boulton

11... La bremenaj muzikistoj

12... Subĉapele – Sten Johansson

Contributie Esperanto Noord-Nederland 2007

Afdelingslid (incl. abonnement LA VERDA STELO) € 12,50

Gezinslid € 6,25

Donateur (minimaal) € 7,00

Abonnement LA VERDA STELO € 7,00

Over te maken op Postbanknr. **3822472** t.n.v.

ESPERANTO NOORD-NEDERLAND te Bedum

Leden van Esperanto Noord-Nederland worden geacht lid te zijn van

ESPERANTO NEDERLAND

Vandaar dat wij hier ook het gironummer ervan vermelden:

Postbanknr. **375522** t.n.v. **ESPERANTO NEDERLAND** te Heerhugowaard

Lidmaatschap (incl. abonnement FEN-X) € 27,50

Gezinslid € 8,00

frontopaĝo: la bremenaj muzikistoj, emblemo de la germana urbo Bremeno

Studosemajfino en Hoek van Holland

La studosemajfino, kiun organizis Esperanto Nederland, okazis en naturamikdomo *Aŭgust Reitsma* en Hoek van Holland komence de novembro. Preskaŭ ĉiuj partoprenantoj jam alvenis vendredon kaj la etoso estis tre bona jam dekomence.

Krom la fidelaj instruistoj Rob Moerbeek kaj Bert de Wit asistis ankaŭ Wil van Ganswijk, Els van Dijk, Sylvain Lelarge kaj Katalin Kováts. S-ino van Ganswijk jam gvidis multajn kursojn en Groningen krom sia kurso interreta, kaj Sylvain kaj Katalin estas la energiaj gvidantoj de Edukado.net. Post la lecionoj de sabato Sylvain rakontis pri *reĝo Arturo kaj la kavaliroj de l' tablo ronda*.

Li ankaŭ sukcesis venigi ĉiujn por danci la *korelativan dancon*, kio estas maniero ekzerci la korelativojn.



korelativa danco

Ĉiu gesto figuras unu el la tabelvortoj. Tiel estis tre amuze memori tiujn malfacilajn vortojn.

Post tio oni povis elekti: en la malgranda salono Katalin prelegis pri sia retejo www.edukado.net, kiu estas tre utila al instruantoj pri Esperanto, sed ankaŭ al tiuj, kiuj ŝatas lerni la lingvon. Ŝi eksplikis kiel la retejo funkcias, rilate al aliaj organizaĵoj. La retejo informas kaj konsilas ties membrojn pri

instrumetodoj, kursoj, ludoj kaj ankaŭ pri ebloj por korespondi.

Post la prelego oni povis spekti la filmon *Gerda Malaperis*.

En la granda salono oni amuziĝis parolante, ludante kaj kantante en Esperanto.



grupo de Wil van Ganswijk

Krom nederlandanoj estis germanoj, belgoj, hispano, la hungara Katalin kaj la franca Sylvain. Jen la nombro de ses diversaj landoj!

Ĉiuj miris pri la fakto, ke la kvinjara filo de Katalin kaj Sylvain povas senpene paroli en la hungara, franca, nederlanda kaj Esperanta lingvoj!



kuir-mirakloj

La sekva studosemajfino okazos de la 16-a ĝis la 18-a de marto 2007 en 'Krikkenaar' apud Almelo. Vidu por informoj la retpaĝon de Esperanto Nederland: www.esperanto-info.nl.

Klubkunvenoj

januaro 2007

- 11 vivanta gazeto
- 25 bildenigmoj – *Luit Staghouwer*

februaro

- 8 jarkunveno
- 22 filmo pri la lernejo en Togo – *Ineke Emmelkamp*

marto

- 8 muelejoj – *Jesse van Oort*
- 22 ludvespero

aprilo

- 5 gramatiko – *Koos Scharroo*
- 19 dancoj – *Wim Rijnders*

majo

- 3 kvizo pri lingvoj – *Bert Begeman*
- 31 kune manĝi

la plej freŝajn novaĵojn kaj ŝanĝojn vi trovos en nia retejo sub la rubriko **Aktuale**.

<http://pingveno.nl/klubo>

Naskiĝtagoj

januaro

- 4 Wil van Ganswijk-Vlasblom
- 13 T. Lanooy-Nijlunsing
- 27 Ineke Emmelkamp
- 28 R.A. Haadsma
- 30 A.W. van der Veen

marto

- 20 K. Dekker
- 24 E. J. Begeman kaj
H. Behr

februaro

- 11 H. van Kappen
- 17 A.A. Bellekom
- 18 S. Kok-Czeswinska
- 28 Luit Staghouwer

aprilo

- 1 T. Bulk-Beenen kaj
L. van Damme
- 6 P. van Kappen-van de Kamp
- 17 R. Heide – *nova adreso*:
'Neboflat', Paterswoldseweg 288, kr 201

Gratulon!


Kio pri la nordo?

la 7-an de septembro 2006

Okazis la unua kunveno post la some-raj ferioj, pri kiuj ni poste parolis, sed komence ni parolis pri aliaj aferoj. Wiebren Akkerman menciis, ke li prelegos pri Esperanto dum kunveno de ANBO, ligo por 50-plusuloj. Jam anoncis sin la unua aŭskultanto, kiu heredis Esperanto-librojn kaj petis de Wiebren informojn pri kio temos la prelego en Balk.

Koos Scharroo menciis la retpaĝojn de *Douwe Beerda* pri *permakulturo*.

Douwe petas helpon traduki ilin en Esperanton. Ĉiu el ni ricevos iom da teksto kaj traduku hejme. Poste, dum la gramatika kunveno de la 30-a de novembro, ni pritraktos la tradukojn. Pri la ferioj: Ineke Emmelkamp iris trajne al Francio. Ĝis Haren ĉio iris glate. Tiam rimarkis ŝia kunvojaĝantino, ke ŝi forgesis sian pasporton. Sed finfine ili alvenis je la konsentita horo en Francio. Kiel memorigaĵojn ŝi aĉetis aboco-librojn.



aboco-libro

Tiaj infanlibroj montras la ĉiutagan vivon de la koncerna lando. Ŝi vojaĝis multe, pro kio ŝi do havas multajn tiajn librojn.

La geedzoj Staghouwer iris interalie al Deventer pro la granda librobazaro. Bonŝance ili trovis lokon por sia aŭto, kaj la bazaro estis ne tro homplena.

Bedaŭrinde ankaŭ ne estis multo da libroj. Vi jam bone divenis: ili eraris pri la dato. Ili ne revenis la postan tagon, ĉar ili aŭdis, ke tiam estos tro da homoj por rigardi librojn. Krome, Luit ŝatas kampadi. Sed la vetero estis aŭ tro varma aŭ tro malseka. Kontraŭe, Bets Dodebier tute ne plendis pri la vetero. Ŝi ja estis eksterlande kiam estis ĉe ni 30 gradojn.

Fine de la vespero Wil van Ganswijk montris fotojn pri la ferioj en Pollando kaj pri la KELI-kongreso en Ĉeĥio. En Pollando ŝi devis veturi per aŭtobuso longan distancon. Ŝi montris sian bileton al la kondukisto, kiu permesis al ŝi eniri. Post du horoj la buso haltis kaj nur tiam la kondukisto diris, ke Wil estis en malĝusta buso. Jam estis tiom malfrue, ke ne plu veturos alia buso. Fakte ŝi eĉ ne sciis kie ŝi estas. Kion fari? Wil finfine akiris helpon de kelkaj personoj por telefoni al siaj gastigantoj. Daŭris ankoraŭ unu horon ĝis ili venis por akompani ŝin, kaj plian horon por la vojaĝo al la gastloko. Iomete pli malfrue ol kutime ni finis tiun ĉi vesperon, dum kiu denove ĉiu, kiu volis paroli, povis paroli.

la 21-an de septembro 2006

Ĉeestis ankaŭ la studento *Marco Boonstra*. Li studas *ĵurnalismen* ĉe la filologia fakultato en Groningen. Por sia studo li devis fari raporton pri iu klubo, kaj li decidis fari ĝin pri nia klubo. Li diris, ke lia raporto temos ĉefe pri la kluba vivo. Li parolos ankaŭ kun Fieke van der Veen.

Komence de la kunveno Koos diligente okupiĝis pri deko da belaj bildvortaroj por komencantoj: *Poŝamikoj*, eldonaĵoj de *Edukado.net*.

Li raportis pri sia serĉkampanjo por aktualigi la faldfolion de *Pasporta Servo*. Estis trafa ekzemplo de la esprimo 'de la ŝranko al la muro'.



specimena paĝo de *Poŝamiko*

Li ankaŭ montris faldfolion de la fako *Interlingvistiko* de la Universitato de Amsterdamo (UvA). La du bildoj en la faldfolio estas 'malnovaj konatoj': la kovrilpaĝa bildo de la broŝuro *Esperanto, van Taalproject tot Levende Taal* kaj bildo de la *Turo de Babel*, kiu estas ankaŭ sur belga poŝtmarko kaj kiu estas pentraĵo de *Pieter Brueghel*. Dum la unua duonjaro de la studojaro 2006-2007 *Interlingvistiko* estas elekta fako por la studentoj de la Universitato de Amsterdamo.

Koos instigis nin diskuti pri *kiu* kaj *kio*. Ĉu estas *kiu* estas *via nomo/adreso*? aŭ *kio* estas *via nomo/adreso*? Kvan-kam ni lernis, ke en tiuj ĉi kazoj la ĝusta korelativo estas *kiu*, la akademiano *Bertil Wennergren*, verkinto de la nova kaj ampleksa Esperanta gramatiko *Pomego*, instruas al ni, ke estas bonaj ambaŭ korelativoj. Ineke ricevis grandan koverton de *Stadspaleis Het Markiezenhof* en Bergen op Zoom. En la koverto estis kelkaj malnovaj Esperanto-libroj. Wil volonte akceptis la librojn por donaci ilin al siaj lernantoj.

Wil sciigis, ke mortis antaŭ nelonge *William Auld*, tre konata angla verkisto. Pasintan jaron ni aŭskultis lian poemon *Ebrio*.

Pluraj personoj (ne nur membroj de nia klubo) okupis sin pri la traduko en Esperanton de la kurso *Permacultuur* de Douwe Beerda.

Pasintan someron Wil estis interalie en Ĉeĥio kaj kunportis kelkajn ekzemplerojn de la libreto *Ŝercoj, la unua cento*, eldonita de la bratislava Esperanto-klubo. Ŝi elektis kelkajn ŝercojn kaj pluraj duopoj voĉlegis ilin.

Ekzemplo:

- *Kiun mi pagu unue, ĉu la fakturo por la elektro aŭ la ŝuldon al la kuracisto?*
 - *La fakturon por la elektro. La kuracisto certe ne venos malŝalti al vi la sangocirkuladon...*



Ŝercoj, la unua cento

Luit kunportis dekon da libroj kaj libretoj kun humoraĵoj. El kelkaj el ili li voĉlegis kelkajn ŝercojn. Ekzemplo el sveda ŝerclibro:

- *Kial vi bezonis treni kun vi televidaparaton el Londono? Tian vi egale bone povas aĉeti ĉi-loke.*
 - *Ho jes, sed mi pli ŝatas la anglajn programojn, ĉar ili estas multe pli bonaj ol la svedaj.*

Post la ŝercado estas tempo por Marco starigi kelkajn demandojn. Johano klarigas, ke povas esti pluraj kialoj ler-

ni Esperanton. Wil eksplikas, kial Zamenhof kreis la lingvon. Jes, la klubo klopodas atentigi la publikon pri Esperanto. Dufoje en jaro estas Malferma Vespero kaj la klubo interalie prezentiĝas okaze de specialaj foiroj. Eblas akcepti nacian lingvon kiel internacian komunikilon, sed tiuokaze oni akceptas ne nur la koncernan lingvon, sed ankaŭ la implicitan kulturon. Krome, la parolantoj de tia neneŭtrala komunikilo, kiu estas la gepatra lingvo por ili, estas en favora pozicio kompare kun homoj, kiuj devas lerni tiun lingvon kiel duan lingvon.

la 5-an de oktobro 2006

La *Malferma Vespero* ne estis anoncita en unu el la urbaj gazetoj, kvankam Johan ja sendis sciigon pri ĝi al kelkaj redakcioj. Sekve de tio ĉeestis nur unu interesiĝanto, *Pieter Stigter*, kiu estas kursano el la nova kursgrupo de Wil. Ŝi vojaĝis ĉi-matene al Assen por intervjuo ĉe *Radio Drente* pri Esperanto kaj pri la anoncita Malferma Vespero. Post tio ni laŭvice rakontis kio estis nia motivo eklerni Esperanton:

Kiel mezlerneano, Pieter ne ŝatis la multajn esceptojn en la gramatiko de la diversaj lingvoj, kiujn li lernis. Kiam li serĉis novan ŝatokupon, li elektis Esperanton pro la regula strukturo kaj pro la gramatiko sen esceptoj de tiu lingvo.

Koos hazarde trovis ion pri Esperanto en Interreto kaj decidis lerni la lingvon. Kiam Luit serĉis novan okupon por fari dum liberaj horoj, li rememoris, ke li iam legis artikolon, en kiu oni nomis Esperanton!

Wiebren, kiu same kiel Wil intencis studi la anglan, serĉis kurson, vidis Esperanto-kurson kaj decidis sekvi ĝin unue.

Ineke trovis tiun kurson samtempe en

la sama gazeto kiel Wiebren, kaj ankaŭ ŝi trastudis ĝin. Ŝi vizitis poste multajn eksterlandajn esperantistojn. Johan havis kolegon, kiun li ofte aŭdis paroli Esperanton telefone, kaj kiam li renkontis la patrinon de tiu kolego, li komencis studi la lingvon. Kion ŝi nome diris kiel reagon al rimarko de Johan, ke estas nur malmultaj esperantistoj? Ŝi diris 'pri tio kulpas *vi*, ĉar tiun lingvon *vi* ne lernis'.

Inter la temoj, pri kiuj ni mallonge parolis, estis Esperanto-tago en Frislando en 2007. Helpe ĉe ties organizado estas petata!

la 19-an de oktobro

Wiebren rakontis pri siaj planoj organizi feston en Frislando. Du datojn ni proponis: la 2-an de junio aŭ la 19-an de majo 2007. 'Ni hisu la velojn!' Amikoj el najbaraj regionoj kaj landoj estos bonvenaj.

Wil rakontis entuziasme pri la intervjuo de Radio Drente. Ni aŭdis ĝin kaj rimarkis, ke ŝi lerte kaj bone respondis la demandojn.

Fine ni parolis pri la fama katamanta verkistino *Marjorie Boulton*. (vidu p.10)

la 2-an de novembro 2006

Speciala gasto: *Roy McCoy*, usonano kiu laboras en la *Centra Oficejo de UEA* en Roterdamo.

Koos raportis pri la centjara jubileo de *Esperanto-Grupo Bremen*. Sep nederlandanoj partoprenis tiun feston la 28-an kaj 29-an de oktobro. Sabaton posttagmeze estis germanlingva prelego pri Esperanto. Vespere prezentiĝis *Kajto*. Dum germana esperantisto rolis kiel interpretisto Koos estis intervjuita de loka radiostacio. En la festa semajnfino la partoprenantoj povis fari promenad-ekskursojn kaj viziti ekspozicion pri Azio en bremena mu-

zeo.

Johan montris foton senditan de Alke, kiu estas membrino de *Esperanto-grupo Unterweser*. Li ankaŭ partoprenis bicikladekskurson, kiun organizis Fieke. Ineke venis al la stacidomo por saluti la naŭ biciklantojn.

Bets sciigis, ke ŝi aŭdis pri propono uzi Esperanton en Eŭropa Unio. Ŝi diris ankaŭ, ke en Malajzio oni malpermesis la uzadon de anglaj vortoj en la malajzia lingvo.

La supra etaĝo de la UEA-domo estas alikonstruata, diris Roy McCoy. La libroj jam trovis lokon en la nova biblioteko (salono Zamenhof).

Poste li entuziasme parolis pri si mem. Montriĝis, ke li estas multflanka persono. Li studis interalie filozofion, sociajn studojn, la hispanan lingvon kaj komputilan kompostadon.



Roy McCoy

Li verkis kelkajn kantojn kaj estas tenoro. Kiel membro de kantgrupo li vojaĝis al Japanio kaj Ĉinio. Dum la turneo li renkontis plurajn studentojn, kiuj studis la anglan, sed oni povis apenaŭ paroli kun tiuj studentoj pro ilia malbona lingvonivelo. Poste li trovis faldfolion pri Esperanto kaj li ĝojis pri la facileco de tiu lingvo. Li lernis Espe-

ranton kaj partoprenis en Universala Kongreso en Budapeŝto kaj ankaŭ en la 85-a UK en Aŭgsburgo. Poste li vizitis la Centran Oficejon en Roterdamo. Laborante kiel kompostadisto en la Centra Oficejo kaj redaktoro interalie de la jarlibro, Roy intencis instrui Esperanton, ĉar li opiniis, ke ĝi estas nesufiĉe respektata. Li volis esti lingvoinstruisto pri la franca aŭ la hispana, ĉar tiel li eble povus 'altrudi' Esperanton al sia dunginto.

Kiam li estis ankoraŭ studento, venis en lian vivon iu mirinda junulino el Meksiko. Montriĝis, ke ŝi respondecis pri la abonoj de 25 revuoj, kiuj iam estis senditaj al lia adreso.

Ĉar li iam legis nur parton de la unua romano en Esperanto kaj scivolis pri la daŭrigo, li poste en Londono prunteprenis la libron kaj finlegis ĝin. La libro estis plenplena de eraroj kaj Roy proponis al UEA reeldoni la libron. Ĉar ties fino al li ne plaĉis, li iomete reverkis la historion kaj enmetis plurajn ŝercojn. En la reeldono, kiun UEA ja akceptis ne estas tiaj ŝanĝoj.

Li kunportis libron pri la okazintaĵoj en Nov-Jorko en la 11-a de la 9-a. Li intencas donaci tiun libron al persono, kiu verkis tre pozitivan recenzon pri la filmo temanta pri tiu katastrofo.

Unue Roy akceptis la oficialan eksplikon, sed poste li draste ŝanĝis sian opinion. En la libro estas pluraj ekzemploj, kiuj montras, ke la oficiala ekspliko ŝajne ne estas ĝusta.

Li finis sian paroladon per anglalingva kanto memverkinta.

la 16-an de novembro 2006

Wil ricevis kelkajn antikvaĵojn, kiujn ŝi montris al ni: interalie enirbiletojn por Esperanto-kongreso en 1920 kaj sekvantaj jaroj, kaj poŝtkarton de s-ro Isbrücker al s-ro Donker en Amster-

damo.

Sekve de iu retmesaĝo al Wil de eks-interretkursano ni parolis pri la avantaĝoj kaj malavantaĝoj de Esperanto rilate al la angla lingvo.

Koos montris al ni kiel Sylvain Lelarge geste instruis la korelativojn dum la lasta studosemajnfino en Hoek van Holland, kio estis tre amuza.

la 30-an de novembro 2006

La programo temis pri *gramatiko*. Sed kiel ofte, ni pli longe parolis pri aliaj aferoj. Do, unue kelkaj sciindaĵoj de novembro.

Wiebren Akkerman parolis pri sia prelego ĉe ANBO pri Esperanto. Ĉeestis 30 aŭskultantoj, ĉiuj pli aĝaj ol 50.

ANBO ja estas ligo de kvindek-plusuloj. Fakte, li parolis ne nur pri Esperanto, sed samtempe gramatikumis pri la frisa lingvo, ĉar la prelego estis en la frisa. Li do devis ekspliki vortojn, kiel *verbo* kaj *subjekto*.

Koos Scharroo estis en Hago ĉe *Internacia Esperanto-Instituto* por *Cseh-kurso*. Li gastloĝis en la libera etaĝo de la Cseh-domo. Kune kun 3 kursanoj li lernis, kiel oni instruas Esperanton parole.


Luit Staghouver parolis pri du el siaj plumamikoj. Tiu en Venezuelo bezonas helpon pri la komputila mastruma sistemo *Linukso*, ĉar la venezuela prezidento malpermesis la uzadon de la fiusona sistemo *Vindoza*.

Luit bezonas ankoraŭ 700 eŭrojn por la plumamiko en Sud-Afriko, por ke tiu povu iri al Pollando por studi pri turismaj aferoj.

La 25-an de novembro okazis la malferma tago de UEA. Ĉeestis Wil van Ganswijk kaj Wiebren Akkerman. Wil aĉetis instrumaterialon, kiel la lasta vidbendo de *Pasporto al la Tuta Mondo*. Dum la prelego de *John Welles*,

iam prezidanto de UEA, ŝi faris notojn, tiel ke ŝi bone povis raporti pri la enhavo.

Ineke Emmelkamp prizorgas por *Esperanto Nederland* la stokon de la tradukitaj libroj *Erik* kaj *Pieter Bas*, verkitaj de *Godfried Bomans*.



Antaŭ nelonge ŝi vendis ekzempleron de *Erik* al neesperantisto, kiu venis al ŝia laborejo, dirante, ke li ŝatas havi de Bomans ĉiujn librojn, eĉ se ili estus en la ĉina. Tiam Ineke petis lin reveni la sekvan tagon, por ke ŝi povu kunporti la libron *Pieter Bas*.

Koos preparis gramatikajn ekzercojn. Li elpensis malgrandan familion kun ties najbaroj. Ni devis kompletigi la tekston per la ĝustaj posedaj pronomoj. Ĉiam estas bone reaŭdi la regulojn.

la 14-an de decembro 2006

Ni dekope finis la jaron 2006 per festvespero, okaze de la naskiĝdato de Zamenhof. Kiel organizi festvesperon? La komenĉo de la kunveno jam estis la sesa kaj duono. Ni interkonsentis, ke ĉiu kunportu ion por manĝi aŭ trinki. La rezulto estis tre bongusta bufedo enhavanta pomtorton ĉe la kafo, kaj sekvis supo, legomtorto, salato, viandfonduo, fromaĝo, kolbaso, stango-pano kun spicita butero, krespoj,

pomkompoto, keksoj, glaciaĵo kaj diversaj trinkaĵoj.

Ineke voĉlegis leteron, kiun ŝi ricevis el Kanado de sia onklo, en kiu li rakontas pri Esperanto-aktivaĵoj de sia patro, la avo de Ineke, en la periodo de antaŭ kaj dum la dua mondmilito.

Sekvis agrabla babilado pri ĉiaj ajn

temoj, ĝis ni alvenis ĉe la temo *bestoj*. Pri tiu temo Wil kunportis divenludon, kiun ni ludis. Laste ni spektis la filmon *Gerda malaperis* kaj finis per dua kafotrinkado, ne post du horoj, la kutima daŭro de niaj kunvenoj, sed post preskaŭ kvar horoj!

Estis tre agrabla festvespero!

Via kato

1. Hodiaŭ estas varma tago;
dormema sub la suna flato
Mi pensas en volupta vago:
"Ho, se mi estus via kato!"

2. Ho, kuŝi, eta hejmtigrino,
Eletendita pelta pezo
Sur via gastigema sino,
Volupta duonanastezo!

3. Aŭ sidi, pli kompakta kato,
Etendi mian glatan kolon,
Dum via varma manoplato
Vibrigus ĉiun spino-colon!

4. Donante kiajn verdajn helojn
Miaj okuloj kiel lumus!
Kiam vi frotus la orelojn,
Kiel mi kontraŭfrote zumus!

5. Kiel sub via mola tiklo
Mi zume vibrus, ĉiu osto,
Spino, skapolo kaj klaviklo
Ĝis la vertebro de la vosto!

6. Miaŭs mi el gorĝ' profunda
Pro tiu dolĉa haŭtgalvano,
En amekstazo malfekunda
Sub via karesanta mano.

7. Sub la kvaropa fingrokombro
Streĉe-malstreĉe mi petolus
Kaj zumus kvazaŭ kat-kolombo.
Vi kuspis min, mi kapriolus.

8. Sed pardoneme mi revenus
Kaj kontraŭ via mano frotus
Peltan mentonon, ree svenus
Kiam vi ree min dorlotus.

9. Ho, kara, esti via kato!
Sen vortoj, pensoj aŭ promesoj
Kuŝi sen devo aŭ debato,
Elektrizita per karesoj!

10. -- Kaj aŭdi viajn kriojn sakrajn
Kaj senti mian finplezuron,
Enpuŝi dudek ungojn akrajn
Plenstreĉe, kroĉe, en femuron...

Marjorie Boulton



La bremenaj muzikistoj

Ĉe kamparano vivis tre maljuna azeno. Pro kadukaj kruroj ĝi ne plu povis fari laboron. Do, por la kamparano la azeno estis ne plu valora, kaj tial li decidis ne plu nutri ĝin. La azeno ĝojis pri la fakto, ke ĝi ne plu bezonis porti pezajn grensakojn, sed manĝon ĝi ja bezonis. Tial ĝi decidis iri al Bremeno kaj tie iĝi kantestro de la urba orkestro.



Survoje ĝi renkontis maljunan hundon. Ties mastro ofte batis ĝin kaj al la hundo estis tre alloga la ideo iri al Bremeno. Ĝi volonte iĝos orkestrano.



Ankaŭ la kato, kiun ili renkontis, estis minacata de sia mastro pro tio, ke ĝi ne plu kapablis kapti musojn. La azeno konsole invitis ĝin kuniri al

Bremeno kaj tie kunkanti kun ili ambaŭ.

Laste ili renkontis kokon, kies mastro intencis meti ĝin en kuirpoton por fari koko-supon per ĝi. La koko fuĝis kaj tre volonte sekvis la aliajn al Bremeno por tie kanti kun ili.

Dum la nokto la kvaropo atingis arbaron. Ili estis lacaj kaj tre malsataj. Lumo radiis el dometo, kie loĝis rabista bando. La fenestro estis alta kaj por vidi, ĉu la rabistoj estis hejme, la kvaropo tre silente grimpis unu sur la alian, por ke ili povu rigardi en la ĉambron.



La rabistoj sidis ĉirkaŭ la tablo, kiu estis plenplena de manĝaĵoj. Pro malsatego la bestoj komencis ĝojkrii tiel laŭte, ke la rabistoj supozis, ke alvenis kiantaj fantomoj. Ili tre timis kaj forfuĝis eĉ trans la bremena landlimo.

Ĉar ili lasis la manĝaĵojn sur la tablo, la kvarteto povis pli ol satmanĝi.

La rabistoj restis for, kaj la bestoj ekloĝis en ilia domo. En Bremeno de tiam neniu rabis ion plu.

Tial, honore al la kvar kri-kantantaj bestoj, la bremenanoj faris monumenton, kiu troviĝas apud la malnova urbodomo. Nuntempe estas eĉ pli da monumentoj dise en la urbo, kaj ĉiu el ili estas alimaniere farbita.

Subĉapele

Hieraŭ posttagmeze mi renkontis mian amikon Bengt survoje hejmen de la laboro. Mi vidis lin de malproksime kaj ŝanĝis trotuaron, sed ankaŭ li transiris la straton, kaj tiam mi ne povis refoje transiri al la alia flanko ĉar li jam estis tro proksima. Do mi devis halti por iom interparoli. La problemo estas, ke iom interparoli kun li povas facile etendiĝi dum horoj.

“Saluton, samideano!”, li entuziasme diris kaj poste transiris al nia nacia lingvo. Mia amiko Bengt tre amas Esperanton. Li amas ĝin tiom, ke li ne volas paroli ĝin, pro timo profani ĝin per lingvaj eraroj. Oni devas konfesi, ke lia timo estas motivita. La dek ses reguloj ne estas tre multaj, tamen ili ne bone akordiĝas kun la pensmaniero de Bengt. Precipe la akuzativon li rigardas kvazaŭ akuzon, de kiu necesas iel eskapi sen kompromitiĝi. Por Bengt la akuzativo estas ia ornamaĵo, kiun oni ŝutas sur vortojn en la fino de frazoj, precipe se la frazo iom longas, iomete kiel oni ŝutas spicherbojn sur pladon antaŭ ol surtabligi ĝin. Akuzativo – la petroselo de Esperanta frazo.

Cetere, mi neniam komprenis kial li honoras min per la titolo *samideano*. Ĝis nun neniam okazis, ke mia amiko Bengt kaj mi havis saman ideon pri io ajn. Kaj ĝuste tio ŝajne tre feliĉigas lin kaj kaŭzas, ke li tre volonte pasigas kelkajn horojn surstrate kun mi, survoje hejmen de la laboro. Se mi ĝuste komprenas lin, mi ludas rolon de ia kanibala animisto por lia misia ekspedicio en la ĝangalon.

Ĉi-foje li volis diskuti la ĉapelojn. Se ‘diskuti’ estas trafa vorto pri lia traktado de iu temo. Lia komenca proklamo estis ‘for la ĉapelojn!’

Kompreneble li diris tion ne en Esperanto, sed en nia nacia lingvo.

Nun necesas informi la leganton, ke nialingve ‘for la ĉapelon!’ estas malnova esprimo de alta estimo, kvazaŭ ‘ni levu la ĉapelon en respekto al...’. Kompreneble, nialande neniu plu vere portas ĉapelon, do temas pri pura metaforo. Kaj ĉiel ajn, mia amiko Bengt tute ne celis tiun sencon de la esprimo. Li pensis pri tute aliaj ĉapeloj, ol tiuj, kiujn oni nialande ne plu portas surkape.

“Mi legis en la gazeto, ke la ĉapeloj ĝenas la komputilojn”, li diris. “Tio ja estas neakceptebla. Ni devas esti modernaj! Ni ne enŝovu iujn diablajn ĉapeletojn, kiuj riskas ŝtopi la komputilojn!”

Mia amiko Bengt estas tre modernema homo, sed li ne scias tre multe pri komputiloj. Kelkfoje li venas al mi kun ia terura teksto, kiun li petas min faksi per mia komputilo al iu Esperanta gazeto. Kompreneble li ne scias la diferencon inter telefakso kaj retpoŝto. Kaj mi ne plu provas klarigi al li tiun distingon, sed prenas la paperon, skanas kaj retas ĝin plu al la koncerna bulteno.

“En kiu gazeto vi tion legis?” mi nun demandis.

“En La Gazeto!” li ripetis.

“Jes, sed en kiu?”

“Mi ja diris! En La Gazeto! En la gazeto La Gazeto!”

Fine mi komprenis la radion kaj komentis: “Ho, do mi divenas! Sendube temas pri la alfabeto, ĉu ne?”

“Jes, mi ja diris. La ĉapelitaj literoj ne bone trairas la komputilojn. Oni enigis ilin kunĉapele, sed ili elvenas senĉapele, kvazaŭ al entombigo!”

Mi nun pensis, ke eble estus bona tak-
tiko parte konsenti kun li, do mi diris:
“Nu, efektive estas ja iom da proble-
moj pri diakritaj literoj en pli frua epo-
ko. Ne nur la ĉapelitaj, sed ankaŭ niaj
literoj kun punktetoj kaj supra ringo ja
kelkfoje estis mistraktataj. Sed hodiaŭ
tio apenaŭ plu estas problemo.”

“Certe estas problemo. Kun la kres-
kanta uzo de komputiloj tio tute mal-
helpos la Finan Venkon!” li aŭguris.
Dum kelka tempo mi meditis pri liaj
propraj manuskriptoj, kreaĵaj fingrofra-
pe per antikva duonpanea tajpilo, kaj
kun mane aldonitaj ĉapeloj. Eble iom
da kreskanta uzo de komputilo ne tro
ĝenus ilian aspekton. Mi tamen ne
kuraĝis prikomenti tiun flankon de la
afero.

“Kion vi do pensas pri nia nacia ling-
vo?” mi anstataŭe scivolis. “Kaj la
franca, germana, hispana ktp, ktp? Ĉu
ankaŭ ili pereos sub la pezo de siaj
supersignoj?”

Sed Bengt ne volis diskuti aliajn ling-
vojn. Por li gravas nur Esperanto.
Krome li verŝajne sufiĉe prudentas por
vidi, ke li nenion povus fari pri la diver-
saj muŝfekaĵoj de naciaj lingvoj gran-
daj. Necesas elekti laborkampon de
konvena amplekso, kaj Esperanto evi-
dente ŝajnas al li oportune manipu-
lebla kampeto.

“En La Gazeto mi jam vidis, ke multaj
spertuloj konsentas, ke necesas nova
alfabeto por eviti la problemojn de
ĉapeloj en komputiloj”, pluis Bengt.
“Jes, ankaŭ mi de temp’ al tempo legis
tiujn proponojn”, mi agnoskis. “Eĉ
ŝajne ne sufiĉas unu nova alfabeto,
ĉar de dudek debatantoj mi vidis du-
dek malsamajn proponojn.”

Kompreneble mi devus jam antaŭvidi,
ke kun mia amiko Bengt jam ne temos
pri dudek, sed pri dudek unu.

“Ili ja principe pravas”, li juĝis. “Sed

bedaŭrinde ili estas kontraŭfunda-
mentaj, ĉar ili uzas du literojn por unu
sono. La Fundamento ja diris unu li-
tero – unu sono, ĉu ne?”

“Jes ja, vi sendube pravas”, mi kon-
sentis iom hipokrite, ĉar se diri la ve-
ron mi efektive neniam legis tiun fa-
man Fundamenton. Mi eĉ ne scias, kie
ĝi troviĝas legebla. Ĉu ĝi estas ĉizita
en iujn ŝtonajn tabulojn ie en Bjalismo-
ko? Aŭ eble konservata en iu Roter-
dama kelo?

“Do mi pripensis la aferon”, Bengt
daŭrigis kun la celkonscio de malrapi-
da sed nehaltigebla ercvagonaro, “kaj
mi trovis la solvon.”

“Vi tamen ne povis trovi novan funda-
mentan alfabeton?” mi riskis kontesti.
“Jes, ja!” diris Bengt kun la fido de pi-
ulo. “Vidu! Du el la supersignitaj literoj
ja efektive reprezentas ne po unu, sed
po du sonojn! Tio ja estas kontraŭfun-
damenta!”

“Ĉ-ĉu?” mi balbutis nenion kom-
prenante.

“Jes! Ĉu vi neniam rimarkis tion?” li
triumfis. “Ĉ ja estas du sonoj, $t + ŝ$! Kaj
same $ĝ$ estas $d + ĵ$. Tio ege faciligas la
aferon. Vidu...”

Ĉi tie necesas interŝovi la komenton,
ke ne tre facilis sekvi la klarigon de
Bengt, pro lia aparta maniero prononci
la koncernajn literojn. Kiel la plej mul-
taj esperantistoj el nia lando, li ne dis-
tingas z de s , nek $ĵ$ de $ŝ$, kaj li normale
prononcas $ĉ$ kiel tj kaj $ĝ$ kiel dj . Krome
li nomis la ĉapelitajn literojn Esperan-
te, sed la ceterajn nacilingve. Do, kion
li fakte diris, estis ‘Tjo estas te plus ŝo,
kaj same djo estas de plus ŝo’. Ta-
men, konante liajn kutimojn, mi post
momenta pripensado sukcesis fari ian
ordon en la konfuzo kaj retrovi lian
pensfadenon.

“Do”, pluis mia reformema amiko
Bengt, “se ni skribu $ŝ$ kiel q , $ĉ$ nature

iĝas *tq*, kaj se *ĵ* estas *j*, do *ĝ* iĝas *dj*. Ĉu ne? Krome *ĥ* estos *x* kaj *ŝ* estos *w*, kaj jen la tuta afero estos glata. Tre facile por la komputiloj, kaj tute fundamente – unu litero – unu sono, male al la nuna ĉapela alfabeto, kiu fakte ne estas fundamenta. Se ne paroli pri tiuj teruraj *x*-sistemoj! Abomenaj! Kaj malfundamentaj!”

Interesa vidpunkto, mi pensis. Sed ĉu vere troviĝas pluraj *x*-sistemoj? Eble jes. Laŭ mia sperto ĉiu esperantisto uzas sian propran sistemon. Cetere, ĉu povas esti hazardo, ke laŭ la alfabeto de Bengt li eĉ skribos la sonon *ĝ* precize kiel li jam nun prononcas *ĝin*, do kiel *dj*? Tamen mi trovis iun hokon en la ezoko.

“Pardonu, sed ĉu mi aŭdis vin diri, ke *j* estos *ĵ*? Aŭ male, ke *ĵ* estos *j*? Sed kiel tio eblos? *J* ja jam estas okupita de *j*, ĉu ne?” mi kvazaŭ balbutis.

“Jes, jes, sed *j* estos *y*, ĉu mi forĝesis diri tion?”

Tiel do ĉio estis klara. Kaj tute fundamenta, kompreneble. Ja estas natura leĝo, ke ĉiu propra propono estas fundamenta, dum tiuj de aliuloj atencas la sanktan Fundamenton. Same ĉiu vorto, kiun oni mem uzas, estas necesa kaj utila radiko, kiu nur pro neglekto ankoraŭ ne estas oficialigita, dum la vortaĉoj misuzataj de aliuloj estas fiaj neologismoj kaj tute superflua balasto, kiu malfaciligas nian karan lingvon al miliardo da kompatindaj ĉinoj kaj sabotas la Finan Venkon.

“Se mi nur povus igi la Akademion akcepti ĉi tiun alfabeton, mi pensas, ke Esperanto estus adoptita de EU, poste de UNO kaj tiel plu. Sed en la Akademio ja troviĝas ĉefe dormantaj antikvuloj, kiuj ne komprenas kion la moderna epoko postulas, kun komputiloj kaj poŝtelefonoj kaj mikroondaj fornoj.

Mi ne perfekte komprenis, kiel la mikroondoj rilatas al literoj kun- aŭ sen-ĉapelaj, tamen timante plian horon da klarigoj, mi decidis preterlasi tiun flanktrakon de la diskuto.

“Sed Bengt”, mi tamen riskis diri, “ĉu vi ne notis, ke jam aperis centoj da internaciaj lingvoj sen supersignoj? Kaj ili ĉiuj pereis! Nur Esperanto travivis ĝis hodiaŭ, kaj eĉ sufiĉe sanas kaj viglas, protektata de siaj ĉapeloj... Ĉu ne povus troviĝi ia kaŭza interligo inter tiuj faktoj?”

Mi fieras diri, ke dum du sekundoj li staris senvorte, mute gapante al mi. Sed tre longe ne eblas mutigi mian amikon Bengt.

“Tute ne”, li diris. “Ĉu vi ne konas Volapukon? Ĝi havis supersignojn, amasojn da supersignoj. kaj ĝi mortis!” “Sed tiuj ja estis punktoj!” mi protestis. “Estas grandega diferenco inter du punktetoj, kiuj alportas neniun ŝirmon, kaj bela, oportuna, bone sidanta ĉapelo, protektanta kontraŭ ĉiaj ajn malagrablajoj, kiuj povus fali sur nian lingvon. Krome...” mi ne sciis, ĉu mi kuraĝos daŭrigi la komedion, sed... nu kial ne? Mi provu! “Krome, ĉu vi ne notis, ke oni akuzas Esperanton pri tio, ke ĝi estas tro eŭropa? Sed nun momenton rigardu tiujn ĉapelojn! Ĉu vi ne rekonas ilin? Ja ne temas pri angla bulĉapelo, nek franca klakĉapelo, nek tirola feltoĉapelo, nek hispana larĝgranda ĉapelo. Rigardu refoje! Ja estas la ĉapelo de ĉina kamparano sur rizokampo!

Ĉu ne evidente? La simbolo de la plimulto de malriĉaj azianoj! Kaj tiun simbolon vi volas demeti, eĉ forĵeti! KREDU MIN, sen la ĉapeloj Esperanto pereus!”

Mi ne vere kredas, ke mi konvinkis lin. Nenio ajn venanta de ekstere povas konvinki mian amikon Bengt. Sed tra-

fis lin momento de ŝanceliĝo kaj foresta rigardo, kaj tiun mi utiligis por levi imagitan ĉapelon en adiaŭa gesto kaj

foriri laŭ la strato, hejmen al mia prokrastita vespermanĝo.

Sten Johansson



Agrablajn Festotagojn

deziras al vi

*la estraroj de
Esperanto Noord-Nederland*



ESPERANTO NOORD-NEDERLAND
T.W.S. Mansholtstraat 25
9728 MC GRONINGEN



ESPERANTO - taal zonder grenzen